# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-09 n-ro 380


# Afriko: konfliktoj: 15 000 afrikanoj estas delokitaj ĉiutage en sia propra lando



Eŭropa Komisiono perskutas Ĉeĥion, Hungarion kaj Pollandon pri divido de rifuĝintoj

Kodumuloj ŝtelis USD$ 70 mln da bitmonoj

Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopiniojn kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

Afriko: konfliktoj: 15 000 afrikanoj estas delokitaj ĉiutage en sia propra lando
*Ĉirkaŭ 2,7 milionoj da personoj p. 03*

Eŭropa Komisiono perskutas Ĉeĥion, Hungarion kaj Pollandon pri divido de rifuĝintoj
*Ili rifuzis justan kvoton de rifuĝintoj p. 04*

Fermiĝis unua Suda-Suda Forumo pri Homaj Rajtoj
*Evoluantaj landoj okupas pli ol 80% de la monda loĝantaro p. 04*

Kodumuloj ŝtelis USD$ 70 mln da bitmonoj
*Atako al la slovena firmao NiceHash p. 05*

Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro
*La 15-a de decembro p. 05*

Hodiaŭe
*John Milton; Maksim Bahdanovi; kaj Azeno p. 06*

# Afriko: konfliktoj: 15 000 afrikanoj estas delokitaj ĉiutage en sia propra lando

Ĉirkaŭ 2,7 milionoj da personoj, kiuj vivas sur la afrika kontinento estis delokitaj ene de sia propra lando, ĉefe pro konfliktoj, de januaro ĝis fine de junio [2017], laŭ raporto de NRO publikigita merkrede [06 dec 2017].



«Tiuj personoj devis fuĝi sian hejmon por eskapi konfliktojn, perforton kaj katastrofojn, ne trapasante internacian landlimon», indikas la raporto de la *Esplorejo pri Internaj Delokadoj* (*Internal Displacement Monitoring Centre*, IDMC), kiu dependas de la Norvegia Konsilio por Rifuĝintoj.

La konfliktoj kaŭzis 75% el la novaj delokadoj, okazintaj en Afriko dum la unua jarduono de 2017, laŭ la statistikoj de la raporto. Demokratia Respubliko Kongo (RDC), Niĝerio kaj Sud-Sudano figuras regule inter la kvin plej tuŝataj landoj de tiu fenomeno. Ĝenerale, Orienta Afriko estas la regiono, kiu plej suferas, mencias la IDMC. En tiu regiono, la delokadoj estas konsekvenco de daŭraj konfliktoj, kiel tiuj, kiuj tuŝas Somalion, Sudanon kaj Sud-Sudanon. Dum la unua jarduono, 997 000 novaj delokigoj, en rilato kun konfliktoj estis registritaj en Demokratia Respubliko Kongo (RDC). Tiu nombro superas tiun observatan dum la tuta jaro 2016, kaj 206 000 aliaj estis registritaj en Centr-Afriko, t.e kvaroble pli ol pasintjare.

«Tiu tragika situacio, kiu senĉese malpliboniĝas, necesigas novan vidpunkton, kiu superas la humanitaran agadon, por lukti kontraŭ la origino kaj la estontaj konsekvencoj de la internaj delokigoj», deklaris la direktorino de la IDMC, Alexandra Bilak, citita en la komunikaĵo. «Por renversi la tendencon, ni devas plifortigi la preventon kaj redukti la riskojn de novaj delokadoj. Tio necesigas adopton de tujaj aranĝoj, bazitaj sur prevento de la konfliktoj, solidigo de la paco, kaj ekonomia kaj politika disvolviĝo ĝenerale», ŝi eksplikis.

La NRO opinias, ke sama vidpunkto devas stariĝi pri la delokadoj pro ekologiaj katastrofoj, per aranĝoj kiuj «kontribuas al limigo de ĝiaj konsekvencoj, de la nombro de delokitaj personoj, kaj de la necesa tempo por rekonstruadi sian vivon».

Neniam Milito Inter Ni

# Eŭropa Komisiono perskutas Ĉeĥion, Hungarion kaj Pollandon pri divido de rifuĝintoj



La Eŭropa Komisiono ĵaŭde [07 dec 2017] decidis procesi kontraŭ Ĉeĥio, Hungario kaj Pollando ĉe la Kortumo de la EU pro tio, ke ili rifuzis justan kvoton de rifuĝintoj.

La Komisiono lanĉis proceson kontraŭ la tri membroŝtatoj en la komenco de la kuranta jaro, sendinte al ili Leteron de Formala Avizo en junio kaj "Racian Opinion" en julio.

La komisiono diris en deklaro, ke la ricevitaj respondoj denove estis nekontentigaj kaj la tri landoj donis neniun indikon, ke ili kontribuos al la efektivigo de la decido pri delokado de rifuĝintoj.

La Komisiono diris, ke Pollando kaj Hungario akceptis neniun rifuĝinton ekde septembro de 2015, post kiam membroŝtatoj de la EU promesis transloki entute 160 000 enmigrintojn el superŝarĝitaj Grekio kaj Italio en du jaroj. Ĉeĥio translokis neniun ekde aŭgusto 2016 kaj faris neniun novan promeson dum pli ol jaro. La tri landoj insistis, ke ilia nacia sekureco estas pli grava ol temeraraj decidoj de institucioj de la EU pri rifuĝintoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Fermiĝis unua Suda-Suda Forumo pri Homaj Rajtoj




La unua Suda-Suda Forumo pri Homaj Rajtoj fermiĝis vendrede [08 dec 2017] en Pekino. Reprezentantoj el diversaj landoj laŭdis Ĉinion pri okazigo de la 2-taga forumo, pozitive taksis gravan signifon de la Suda-suda kunlaboro en disvolvado de homaj rajtoj en la mondo, kaj esprimis esperon striktigi ĉi-rilatajn interŝanĝojn.

Evoluantaj landoj okupas pli ol 80% de la monda loĝantaro. Sed delonge la evoluintaj landoj havas pli da parolrajto en disvolvado de homaj rajtoj. Lionel Variron, ĝenerala diektoro de la franca konsultiĝa kompanio CEC, diris, ke la Suda-Suda Forumo pri Homaj Rajtoj servas kiel platformo por komunikado kaj interŝanĝo inter evoluantaj landoj en disvolvado de homaj rajtoj kaj helpas al tiuj landoj pliigi konsentojn kaj aŭdigi pli laŭtan voĉon sur la internacia tereno.

En la pasintaj kvin jaroj, Ĉinio, kiel unu el la evoluintaj landoj, prezentis multajn novajn ideojn, kondukis novajn praktikojn kaj akumulis spertojn. Ĉina prezidanto Xi Jinping [ɕǐ tɕìn.pʰǐŋ 习近平] proponis konstrui komunumon de komuna estonteco de la homaro, prezentante la ĉinan planon por antaŭenigi la mondan regadon pri homaj rajtoj en ĝusta direkto.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## Kodumuloj ŝtelis US$70mln da bitmonoj

Per informadika atako al la slovena firmao *NiceHash* – kiu mastrumas fakan platformon pri servoj je virtualaj valutoj – nekonataj kodumuloj ŝtelis pli ol 4 700 bitmonojn, kiu egalas al ĉirkaŭ 70 milionoj da usonaj dolaroj.



Laŭ informo fare de la gazeto *"Delo"* (ĵaŭde la 7-an de decembro en Ljubljano), la firmao *NiceHash* fermis aliradon al sia platformo post rimarki matene de tiu tago, ke kodumuloj ĝiris la bitmonojn el ĝia virtuala monujo al alia retloko.

Pro tio, ke tiu mono ne havas ajnan respondecan organizon, la priŝtelita firmao agnoskis la malaperintan sumon kiel perdon, kaj rekomendis al siaj klientoj ke ili nepre ŝanĝu siajn pasvortojn antaŭ uzi la platformon. Krome ĝi denuncis la okazintaĵon al la koncernaj aŭtoritatoj, kaj promesis plibonigi la sekurnivelojn.

En la lastaj tagoj la bitmono spertas sinsekvajn kurzaltiĝojn, kaj ĝia unuo jam alproksimiĝas al 15 mil usonaj dolaroj.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

---

## Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro

Kadre de la Jaro de la Lernanto en 2016 ILEI lanĉis novan agadon: Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro.

En Pollando estas la kutimo ke la tuta popolo en certa preciza tago legas la saman tekston. Tio donas ian komunan senton, kiu estas pozitiva afero. Tiu kutimo koncernas la tutan polan popolon. Kial ni ne faru la samon en la tuta Movado?




En nia Movado estas jam diversaj kutimoj kaj agadoj por sugesti, rekomendi legadon al niaj membroj. La *Esperanto-Sumoo*, kiun ILEI aŭspicias, lanĉita de nia japana kolego Hori Jasuo, estas bona ekzemplo.

La 15-a de decembro estas la Tago de la Libro. Do tiam ni aĉetu librojn, kaj pli bone legi ilin ol lasi ilin sub polvo sur breto.


Oni legu en tiu tago la saman tekston. Ne povas esti kompleta libro, ĉar horoj mankus por tia legado. Por la jaro 2016 oni elektis poemon de Tibor Sekelj.

Por la 15-a de decembro 2017 la elektita teksto estas *Esperanto kaj demokratio*, verkita de japana pacifistino, Verda Majo (vidu).

La tekston vi povas elŝuti ĉi tie (vidu).

Vi povas legi la tekston individue aŭ en grupoj. Opinioj, spertoj, reagoj pri la teksto aŭ la agado bonvenas en la rilata fadeno de nia Forumo (vidu).

edukado.net



## John Milton

John Milton (9-a de decembro 1608 – 8-a de novembro 1674) estis angla poeto, kiu verkis prozon kaj poezion en latina kaj angla lingvoj. Lia plej konata verko estas la eposo *Perdita Paradizo* (originale *Paradise Lost*).


Vikipedio

## Maksim Bahdanoviĉ



Maksim Bahdanoviĉ (beloruse Максім Багдановіч, naskiĝis la 27-an de novembro (laŭ la Julia kalendaro la 9-an de decembro) 1891 en Minsko - mortis la 13-an/25-an de majo 1917 en Jalto) estis belorusa poeto, publicisto, tradukisto, klasikulo de belorusa literaturo kaj unu el fondintoj de la moderna belorusa lingvo.

Vikipedio



## Bildo de la tago

Kolorlitografio de Somalia sovaĝa azeno (*Equus africanus somaliensis*) Muzeo de Natura Historio, Parizo: 1869.

Vikipedio